# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

# IPR

Eldonata de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj
ILEI

Jarkolekto 7 N-ro 1, 1977

Pizo, Italujo

Internacia Pedagogia Revuo, n-ro 1, 1977

Enhavo


| | Paĝo |
|---|---|
| *** Omaĝe al pedagogo *Célestin Freinet* | |
| *Leo Lentaigne* | 1 |
| *L. Robert* | 2 |
| *Mario Dazzini* - Kunsido de Ilei-estraro en Budapeŝto | 4 |
| *** Du proponoj por la nova statuto | |
| dana propono | 18 |
| sveda propono | 21 |
| *Gaston Turin* - Al la aŭtoroj de artikoloj por IPR | 24 |


# omaĝe al pedagogo Célestin Freinet

**omaĝe al la granda franca pedagogo *Célestin Freinet* ni prezentas du artikolojn, la unua de *Leo Lentaigne*, la dua de *L. Robert*.**

Antaŭ dek jaroj mortis la franca pedagogo *Freinet*. Kvankam lia agadkampo estis ĉefe Francujo, li konstante celis konigi siajn principojn al la tuta mondo. Kaj li certagrade influis ankaŭ la internacian pedagogion. Pro multaj kaŭzoj lia vivo, agado kaj celo povas interesi la Esperantajn instruistojn.

Dum la unua mondmilito la juna instruisto *Freinet* estis grave vundita ĉe la pulmo. Li poste ricevis postenon en malgranda vilaĝo *Bar-sur-Loup* (proksime de Nico). Sed kvankam li ŝatis sian metion kaj amis la infanojn, li ne kontentige povis ĝin plenumi, ĉar paroli la tutan tagon estis por li ege penige. Kion fari? Ĉu elekti alian metion? Ĉu daŭrigi? Kiel solvi la problemon?

«Anstataŭ paroli de sur mia estrado, li pensis, mi devas organizi la aferon tiamaniere, ke la infanoj laboru per si mem." Kaj li streĉis sian volon al tiu celo.

Iun tagon li rimarkis la intereson de la infanoj por malnova skribmaŝino, kiu kuŝis en angulo de la klaso, kiam ili povis tajpi frazojn aŭ tekstojn de ili mem verkitajn. Tio naskis la ideon aĉeti presmaterialon, kiun povus uzi la infanoj. Kaj li bonŝance trovis malmodernan presilon, kiun ne plu bezonis presisto.

Ne priskribebla estis la entuziasmo de la infanoj, kiuj ek de tiu tago volis skribi tekstojn por ĝui la plezuron vidi ilin presitaj. Tie kuŝas la tuta kerno de la metodo: krei favorajn kondiĉojn kiuj naskas ĉe la infanoj la deziron verki.

Do, laŭ certa procedo, pri kiu la detaloj povas interesi nur la fakulojn, la infanoj verkas, presas, realigas modestan lernejan revueton, kiu per poŝto estas sendita al lernejoj, kiuj laboras laŭ la sama metodo, estas legata de dekoj da aliaj lernantoj, de la gepatroj, ktp.

Jen do la infanoj havas motivon por skribi.

*Freinet* estis vera pioniro tipa. Li estis, por multaj, «herezulo», al kiu oni devas malfidi! Enkonduki presmaterialon en lernejon, en epoko kiam ĉiuj uzas la plumingon: istigi la lernantojn verki libere, dum kutime oni devigas ilin skribi pri difinita temo, estus du kaŭzoj sufiĉaj por konsideri lin kiel suspektindan homon. Sed tiam plene floradis la Tria Internacio, kun kiu li pli malpli amindumis. Li fariĝis «danĝera» homo, kaj li bone konsciis, ke por daŭrigi siajn eksperimentojn li nepre devas krei «privatan lernejon» (1934). Kompreneble, ĉio evoluas. Kio estis «danĝera utopio», estas hodiaŭ «modelo sekvenda»!...

La granda merito de *Freinet* rilatas esence pedagogion, ĉar li montris per propra ekzemplo, kiel ĉiu ordinara instruisto povas, en la kadro de la vivo mem, malgraŭ la programoj, malgraŭ la ekzamenoj, modernigi radikale siajn instrumetodojn kaj fari, ke ili estu liberigaj por la proletidoj. Sed li faris pli. Ĉirkaŭ li grupiĝis centoj kaj miloj da instruistoj, kiuj sin deklaris ne nur adeptoj, sed kunbatalantoj. Ili

koopere kontribuis al pliampleksigo, plivastigo de la metodoj kaj teĥnikoj. Jen komunistoj, socialistoj, anarĥiemaj kamaradoj kaj senpartiuloj juĝas, ĉiu laŭ sia vidpunkto, ke tiu movado estas proleta, liberiga kaj servas ilian idealon!

Kaj verŝajne estas unika fakto en la proleta movado, ke de 1924 okazis en tiu *Freinet*-movado neniu skismo kaj ke en ĝi ĉiuj sentas sin hejmece.

Kiel esperantistoj, ni aparte havas intereson por ĝi. «Grajnoj en Vento» estas rekte insiprita de *Freinet*-metodoj. Freinet havis simpation por Esperanto, ne pro ĝia idealo, al kiu li ne plene fidis, sed ĉar ĝi utilas la movadon. Ni menciu, ekzemple, ke ĉiujare okaze de la kongreso, kiu arigas 500-1000 anojn, unu eksterlanda instruisto salutas la gekongresanojn en Esperanto, regule ekde 1949!

Krome, ĉar la instruistoj de tiu movado estas progresemaj, ĉar ili agnoskas la meritojn de Esperanto por faciligi la internaciajn rilatojn inter la lernejoj, ili havas emon lerni kaj praktiki la lingvon. Ni do povas konkludi, ke tiu movado estas favora tereno por Esperanto.

Jam de dek jaroj mortis *Freinet*.

Post konsterno de la anaro ĉiu sin demandis: «Kaj nun? Ĉu mortos la idealo kaj la movado? » Sed ĉiuj streĉis siajn fortojn, kaj kun espero ni povas respondi ne. La movado postvivos sian kreinton, kiel Esperanto postvivis Zamenhofon.

*Leo Lentaigne*

RIDEF: *(Rencontre Internationale Des Educateurs Freinet)* signifas: «Internacia renkontiĝo de geinstruistoj instruantaj laŭ *Freinet*-pedagogio». Sed, kio estas tiu *Freinet*-pedagogio? ... Por trafe taksi kaj kompreni ĝin necesas iom scii pri la vivo de *Freinet,* ties elpensinto.

Freinet naskiĝis en la jaro 1896, en malriĉula Provenca familio. En 1917, novbakita instruisto, li estas ĵetita en la ŝtormon de la unua mondmilito: gravege pulmvundite li preskaŭ mortas. Pli malpli resaniĝinte li tamen ricevas postenon en 1920 ĉe elementa lernejo. Sed li malfacile eltenas instrulaboron, kiu postulas longajn paroladojn, – pro sia limigita spirpovo... Multe leginte el verkoj de famkonataj pedagogoj, kiel *Maria Montessori, Dewey, Decroly,* Makarenko, li sopiras al pli natura kaj racia instrumetodo: li antaŭ sentas, ke infanoj posedas en si mem nemezureblan potencialon. Tiam prezentiĝas favora okazo por vere motivita laboro: kolektiva redaktado de la unua libertema verkaĵo (la helik-vetkurado), en granda entuziasmo. Vivo ĵus eniris la klasĉambron kaj ne plu eliros. Sinsekve *Freinet* enkondukas, krom libertemaj verkaĵoj, enketojn, memesplorajn taskojn kun raportoj, klasgazeton, korespondadon.....

1924: unua interŝanĝo kun gelernantoj en Bretonio.



1926: unua metiista presilo el ligno, kiu ebligas aperigon de la unua presita lerneja gazeto.

1928: ĉar rapide multnombriĝas la ronda da disĉiploj, kaj por fabriki kaj distribuadi la ilojn de tiuj bezonatajn: kreado de la CEL *(Coopérative de l'Enseigenemnt Laïci)* = Kooperativo por Laika Instruado. Nun ĝi eldonas ĉiujn revuojn kaj fabrikas ĉiujn ilojn ellaboritajn de la diversaj laborkomisionoj kaj de laborantaj gelernantoj el ĉirkaŭ 20.000 klasoj de la moderna lernejo.

Sed ege malplaĉas al la reganta burĝaro tiu pedagogia metodo, kiu estas esence popola kaj celas al ekukado de ĉiuj infanoj sen ia diskriminacio, por ke ankaŭ la malriĉuloj fariĝu homoj konsciaj pri sia digno. *Freinet* tial ricevas gravan baton de la lokaj burĝoj, kiuj sukcesas atingi lian eksigon. Ne plu povante instruadi en oficiala lernejo, *Freinet* mem konstruadas privatan en la Provenca vilaĝo *Vence,* en kiu li tute libere povos eksperimenti siajn teĥnikojn.

1939: denove tutmonda sanga ŝtormego. *Freinet* enkarcerigita pro siaj ideoj: iom poste liberigita, sed sub streĉaj kondiĉoj. Lernejo en *Vence* fermita. Fuĝado: militrezistado en Alpoj...

En 1947 la lernejoj en *Vence* denove malfermiĝas. Laŭvojo pli malpli glata la afero progresas: kongresoj ĉiujare arigas geinstruistojn pli kaj pli multnombrajn. Modernaj *Freinet*-teĥnikoj eĉ tutmonde disvastiĝas: tial en 1964, naskiĝas la FIMEM.

FIMEM (*Féderation Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne* – Internacia Federacio de la Movadoj pri Moderna Lernado). Ĝi radias al tridekok landoj. Ĝia franca sekcio estas ICEM (*Institut Coopératif de l'Ecole Moderne* – Koopera Instituto pri Moderna Lernado). Ĝi strukturiĝas el distriktaj grupoj, laborkomisionoj, eldonas du bultenojn kaj dekon da diversaj revuoj por infanoj, adoleskantoj kaj plenkreskuloj.

La 8a de oktobro 1966 mortis tiu altvalora homo, kiu forkonsumis ĉiujn siajn fortojn cele al starigo de edukado vere popola.

## Bazaj ideoj de la Freinet-pedagogio

Edukado celas plenan disvolviĝon de la individuo, sed ne ties dresadon, nek submetiĝon, ankaŭ ne akumuladon de sciado en lia cerbo. Forpelata ja estas ĉia doktrinigo aŭ dogmigo. La infano fariĝu estonte kapabla repondeculo en socio morgaŭa, el kiu malaperu milito, rasismo, diversspeca diskriminacio, ekspluatado de homo fare de homo. Nur la vivo plenefike instruas homon: por akiri ĝiajn sciigojn ni sekvu naturajn vojojn. *Freinet* konvinkiĝis, ke ĉia mensa akirajo efektiviĝas per propra esplor-eksperimentado. Vera kaj profunda ekudado fontas el laboro, sed el laboro motivita kaj libere elektita: nu, lernotaj temoj nepre venu de la infanoj mem. Konsiderante, ke esprimdeziro, impeta emo al komunikado kaj agado, estas nepraj kaj esencaj bezonoj ĉe infano, ni ebligu al tiu ĉi kreivan laboron. La infano trovu en lernejo fidoplenan etoson, kompreneman medion kun libere akceptita disciplino. Lernejo iĝu esence popola kaj plej altgrade emancipanta tiel por la geinstruistoj, kiel por la gelernantoj.

Celoj de RIDEF

Daŭre vigle postvivadas la giganta verko de *Freinet*. Pri tio atestas interalie la vivoplenaj renkontiĝoj okaze de RIDEF, en kiu ariĝas ne nur geinstruistoj, sed ankaŭ pedagogiaj serĉantoj, studentoj kaj simpatiantoj kun la *Freinet*-pedagogio, por pliprofundigo de pedagogiaj scioj, kaj ankaŭ por interŝanĝoj pri ideoj kaj eksperimentrezultoj.

Ĝi aparte celas:

- ebligi informadon pri stato de la *Freinet*-pedagogio kaj de la progresemaj pedagogioj en diversaj landoj;
- faciligi diversfacetan malkovron de la akceptlando;
- eksperimentadi en daŭra formado de la instru-edukistoj per ekipa laborado okaze de aktivaj faraĵoj en esplorado, kreado, kaj komunikado.

En RIDEF Esperanto devus esti komunikilo.

«La *Freinet*-pedagogio ne povas esti alia ol Internacia. Tiu internacieco estas ne nur moto, sed ĝi estas nepra neceso. Ĝi estas bazo de paco.» (El la Ĉarto de Moderna Edukado – *Freinet*-teĥnikoj).

La RIDEF-oj estas internaciaj; sed pro tio mem ofte estiĝas malfacilaĵoj pro lingvo. Tiujare, en la naskiĝlando de Zamenhof, kelkaj laborkomisionoj – kiel iam unu en *Hillerod* (Danujo) – uzos Esperanton, en siaj debatoj, kiel oficialan lingvon. Krom tio, inter la diversdevenaj partoprenantoj, kaj ĉefe kun la polaj, interplektiĝos amikecaj rektaj kontaktoj, kies fruktodonon tute ne necesas emfazi.

Antaŭ-RIDEF 1977.

Ĝi okazos en *Artigues près Bordeaux (Maison de la Promotion Sociale)*, Francujo, de la 2a ĝis la 14a de julio 1977. Same kiel dum la pasintjara en *Grésillon*, eblos al la partoprenantoj eklerni Esperanton aŭ progresi en lingvo-uzado dank' al diversgradaj Esperanto-kursoj; ankaŭ prepari sin por fruktodona laboro dum la tuja RIDEF en Lisbono, per kunlaborado en diverstemaj laborgrupoj. Krome, tiean restadon agrabligos distraĵoj (ludoj, kantoj, ekskursoj, eblecoj por sportumado,...).

Eĉ kiuj ne povos poste partopreni en la RIDEF sed tamen deziras plibonigi sian kapablon en Esperanto-uzado, tiuj rajtas partopreni en la Antaŭ-RIDEF, kie ili estos bonvenaj.

Konsilinde estas ĉeesti dum la tuta daŭro (12 tagojn). Tamen eblos partopreni nur parte laŭ periodoj sestagojn daŭraj, ĉu de la 2a ĝis la 8a, ĉu de la 8a ĝis la 14a.

Por ricevi detalajn informojn, la interesatoj bonvolu tuj skribi al: Léo Robert, 11 rue des frères Lumière, F-33150 Cenon, Francujo.

Ne atendu! Ju pli frue, des pli sekure por certe ricevi lokon.

*L. Robert*



# kunsido de Ilei-estraro en Budapeŝto

**Protokoloj de la kunsidoj en Budapeŝto, 19761231-770105.**

Ĉeestis: Rektoro Helmut Sonnabend (prezidanto), d-ro Prof. Mario Dazzini (ĝenerala sekretario), s-ro Johano Ingusz (vicprezidanto) s-ro Gaston Turin (vicsekretario) s-ro Olle Olsson (kasisto). Ĉeestis kiel gastoj: s-ino Marcelle Turin, s-ino Karin Ruf, d-rino Prof. Katina Dazzini

Oni decidis akcepti la suban tagordon:

1-0 - VI Vintra Esperanto-Ferio kaj Silvestra balo en la kulturdomo
2-0 - Ĝenerala diskuto pri la interna strukturo de ILEI
2-1 - Raporto kaj proponoj de la prezidanto
2-2 - Raporto kaj proponoj de la vicprezidanto
2-3 - Raporto kaj proponoj de la ĝenerala sekretario
2-4 - Raporto kaj proponoj de la vicsekretario
3-0 - Planigo kaj celado de la oficialaj vizitoj
3-1 - Vizito al la klerig-ministerio
3-2 - Vizito al la Pedagoga Sindikato.
3-3 - Vizito al la teritoriaj reprezentantoj de la instrua komisiono de H.E.A. (ILEI-sekcio)
3-4 - Vizito al Hungara Esperanto-Asocio
3-5 - Vizito al vic-ĉefsekciestro pri Budapeŝtaj klerigaj Aferoj en la Urbodomo.
3-6 - Vizito al la Universitato Eötvös Lorand
3-7 - Vizito al fakmezlernejo Egressy Gabor
3-8 - Vizito al la esperantfakaj gelernantoj de Tomori-lernejo
4-0 - Sciigoj de la estraranoj
4-1 - Sciigoj de la prezidanto
.1 - Rilatoj kun Unesko
.2 - Jura stato de ILEI
.3 - Deklaro de la prezidanto pri la interkonsento inter ILEI kaj UEA
.4 - Nuna stato de lerneja eksperimento en la 2a regiono
.5 - Rilatoj inter ILEI kaj AEDE
4-2 - Sciigoj de la kasisto
4-3 - Sciigoj de la ĝenerala sekretario

4-4 - Sciigoj de la vicprezidanto
5-0 - Redaktado de IPR
5-1 - Lingva kontrolkomisiono
5-2 - Unuiĝo de la kasoj de IPR kaj ILEI
6-0 - XIa Internacia Konferenco de ILEI (19770714-24)
6-1 - Planado kaj fiksado de la konferenco en Luksemburgujo
6-2 - Fiksado de la programo de la XIa Internacia Konferenco de ILEI
7-0 - Resumo de la laboroj

**Programo**

| | | |
|---|---|---|
| 19761230 | h. 17 | Kulturdomo – Prelego de prof. d-ro Mario Dazzini pri «Celoj kaj labormetodo de Ilei». |
| 19761231 | h. 20 | Partopreno al la vespermanĝo kaj silvestra balo en la kulturdomo. |
| 19770101 | h. 15 – 19 | unua estrarkunsido |
| | h. 20 – 21.30 | dua estrarkunsido |
| 19770102 | h. 9 – 11.30 | tria estrarkunsido |
| | h. 12 | Restoracio Esperanto – Komuna tagmanĝo kun la membroj de la «instrua komisiono» de Hea. |
| | h. 15 | Kunsido en la sidejo de Hea kun la teritoriaj reprezentantoj de la instrua komisiono de Hea. |
| | h. 20 – 24 | kvara estrarkunsido |
| 19770103 | h. 9 | Vizito al fakmezlernejo *Egressy Gabor* |
| | h. 11 | Vizito al klerig-ministrejo |
| | h. 14.30 | Vizito al pedagoga sindikato |
| | h. 16 | Vizito al Hungara Esperanto-Asocio |
| | h. 23 – 24.30 | kvina estrarkunsido |
| 19770104 | h. 10 | Vizito al vic-ĉefsekciestro pri Budapeŝtaj klerigaj kaj kulturaj aferoj. |
| | h. 12 | Vizito al vic-dekano de la universitato *Eötvös Lorand* |
| | h. 13 | Vizito al katedestro pri aplikita lingvistiko |
| | h. 16 | Vizito al Esperantofakaj gelernantoj de la *Tomori*-lernejo. |
| | h. 23 – 1.45 | sesa estrarkunsido |
| 19770105 | h. 9 – 12 | sepa estrarkunsido |



**Estrarkunsidoj**

1-0 - **VIa vintra esperanto-ferio kaj silvestra balo en la kulturdomo.**

Akceptante la inviton flanke de la organiza komitato de la VIa Vintra Esperanto-Ferio, d-ro prof. Mario Dazzini, ĝenerala sekretario de Ilei, prelegis je la 17 horo de 19761230 en la Kulturdomo, pri " Celoj kaj labormetodo de Ilei", donante klarigojn dum la diskutado kaj respondante al kelkaj de bulgara, ĉeĥoslovaka, itala kaj soveta gekolegoj.

2-0 - **Ĝenerala diskuto pri la interna strukturo de ILEI**

Sub la titolo ĝenerala diskuto pri la interna strukturo de ILEI, la prezidanto malfermis la diskutadon pri la demando ĉu la nuna interna strukturo de ILEI estas ĝusta kaj taŭga, ĉu ĝi povas kontentigi kaj ebligi nacian ekonomian laboron. Leviĝis ankaŭ la demando ĉu la nura sekcia sistemo sufiĉas.

2-1 - **Raporto kaj proponoj de la prezidanto**

La prezidanto informis la estraron pri la fakto ke li petis s-ron Tsaut, Svislando, reorganizi, post la demisioj de d-ro Greutert, la sekcion transprenante provizore la sekciestrecon.
Pri la kunlaboro kun esperantaj organizaĵoj, la prezidanto partoprenis la 2an Konferencon de NEM en Parizo dum du tagoj, kaj komisiite esploris la eblecon de kunlaboro inter la du organizoj en la instrukampo. Li konstatis ke NEM, havante nek estraron nek komitaton, ne estas organizaĵo ĉar por ILEI ne estas partnero kun kiu ĝi povas pritrakti lernejajn aferojn, la prezidanto konsilis atendi pluan evoluon.

2-2 - **Raporto kaj proponoj de la vic-prezidanto**

Kolego Ingusz atentigis ke la gekolegoj ne ĉiam havas la eblecon partopreni internaciajn konferencojn kiuj estas tro malproksimaj. Ekestas la problemo de la pagpovo:pro tio li sugestas aranĝi regionajn konferencojn ĉar ili ebligas pli efektivan partoprenon.

2-3 - **Raporto kaj proponoj de la ĝenerala sekretario.**

Kolego Dazzini sugestas plibonigi nian laborsistemon laŭ du direktoj: a) fondi ĉie en la kontinentaj zonoj centrojn, ekzemple en Eŭropo, en Budapesto kaj Parizo. Tasko de la centroj estu kunordigi la tutan ampleksan laboron de ILEI, laŭ la priskribo en la statuto de ILEI, ekzemple aranĝi superajn ekzamenojn, organizi pedagogiajn seminariojn, organizi reciprokajn interŝanĝojn de spertoj rilate plibonigon kaj modernigon de esperanto-instruado; daŭre aranĝi diversajn internaciajn kunvenojn por infanoj kaj eduki la infanojn al internacia interkompreniĝo. Tio signifas ke la centroj helpu la regionajn sekciojn plenumi diversajn taskojn, kiel ekzemple organizi landajn renkontiĝojn de la infanoj;
b) regule konferenci en aliaj zonoj de ILEI, por ebligi la partoprenon en iu zono de la instruistoj.

2-4 - **Raporto kaj proponoj de la vic-sekretario.**

Kolego Turin opinias ke ekzemple en la franca sekcio mankas la internacia sento:la instruistaro estas tie tro forte ligita al la registaraj direktivoj, tiel ke la geinstruistoj ne inklinas al internaciaj problemoj.

La estraro akceptis la proponon krei centron en Budapesto kaj Parizo kaj la sugeston regule konferenci en aliaj zonoj de ILEI. Por ebligi la plian partoprenon de geinstruistoj en iu zono, la estraro proponis organizi la sistemon de reciproka gastigado, tio estas ke, ekzemple, kolegoj el Aŭstrujo ricevos la eblecon partopreni, pere de kolegoj kiuj gastigos ilin dum la tempo de la konferenco kaj la sekcioj helpantaj de la diversaj centroj sendos delegitojn aŭ partoprenantojn subvenciitajn.

La estraro konsideris la kreadon de fonduso por same subvencii gekolegojn el foraj landoj.

3-0 - **Planigo kaj celado de la oficialaj vizitoj**

La estraro amplekse diskutas pri la prezentiĝo ĉe la diversaj publikaj instancoj.

Pri la vizito al la teritoriaj respondeculoj de la instrua komisiono de HEA, la estraro decidas ke, post aŭskultado de la informoj pri la laboro farita flanke de la instrua komisiono, reciproke informos pri la celoj kaj laborsistemo de ILEI kaj sugestos ekzameni la eblecojn starigi en Budapeŝto centron kiu kunordigos la pedagogian laboron de la sekcioj en la socialismaj landoj.

Pri la vizito en la klerigministerio, la estraro decidas danki kaj informi pri jenaj punktoj:

1) la prezidanto dankos pro la eminenta kaj favora apogo de esperanto-instruado en Hungarujo, laŭ tri vidpunktoj:
   a) la scienca edukado de esperanto-instruistoj en la Universitato Eötvös Lorand sub la gvidado de d-ro Prof. Szerdahelyi kaj la porinstruista laboro en disaj pedagogiaj altlernejoj;
   b) la multflanka instruado de esperanto en la lernejoj, precipe en la lernejo de Tomori-strato, kie estas deviga studobjekto, esperanto;
   c) la konsekvenca aplikado de esperanto en diversaj multflankaj tendumadoj internaciaj, kombine kun riĉa korespondado kun infanoj de la tuta mondo;
2) la ĝenerala sekretario informos pri la laboro de ILEI;
3) la vic-sekretario informos pri Frenet-movado kaj pri kunlaboro kun ILEI;
4) la prezidanto parolos pri la aktiveco de ILEI en la kampo de lernejaj eksperimentoj, montrante la celojn de la eksperimentoj;
5) oni donos informojn pri la agado de la parlamentanoj en Italujo, Francujo ktp.

Pri la vizito al pedagoga sindikato, la estraro gratulos kaj dankos pro la unua pozitiva paŝo rilate la uzadon de esperanto, flanke de s-ro Gaspar. Oni montros ke ILEI internacie laboras sur tiu ĉi kampo, en ĉiuj partoj de la mondo kaj informos pri la pozitiva eĥo, dum niaj vizitoj, ĉe aliaj sindikatoj en Francujo, Germanujo kaj Sanmarino.

ILEI deziras apogi ĉiujn seriozajn klopodojn eduki la infanojn al internacia interkompreniĝo, al estimo de la homo kaj finfine trovi la leĝojn por la paco. ILEI vidas la necesan kondiĉon instrui komunan lingvon por ĉiuj infanoj, evitante per tio la lingvan ĥaoson en la mondo. La estraro petos ke la hungara sindikato informu siajn membrojn pri la valoro de internacia lingvo kaj eĉ apliku esperanton en internaciaj konferencoj.



Pri la vizito al Hungara Esperanto-Asocio, la estraro decidas prezenti interalie planon pri starigo de centro en Budapeŝto pri la kunordigo de la pedagogia laboro de la ILEI-sekcioj en la socialismaj landoj. Samtempe la estraro esploros pri la abonigado al IPR de la Hungara ILEI-sekcio.

Pri la vizito al Vicĉefsekciestro pri Budapestaj klerigaj kaj kulturaj aferoj, la estraro decidas unue informiĝi pri la esperanto-fako en la diversaj lernejaj tipoj, poste demandi pri la eblecoj instrui esperanton en la metiaj lernejoj, en gimnaziaj kaj mezgradaj lernejoj, menciante la nunan sistemon de lernejaj eksperimentoj por lingve orientiĝi, en la angla lingvo aŭ kiel nun, en esperanto, en okcidentaj lernejoj. La estraro demandos la ĉefsekciestron pri similaj eblecoj en la elementaj lernejoj, rilate esperanton, prepari tiucelajn sciencajn eksperimentojn.

Pri la vizito al la Universitato Eötvös Lorand, la estraro decidas peti la dekanon ebligi al eksterlandanoj la partoprenon al koresponda kurso, kun la celo atingi la diplomon pri Interlingvistiko, Esperantologio kaj Metodologio de esperanto.

3-1 - **Vizito al la Klerigministerio.** 19770103. 11a

Akceptis la estraron kaj la akompanantojn la ĝenerala sekretario pri Ĝeneralaj Lernejaj Aferoj, s-ro Laszlò Szabò kaj d-rino Marta Cser.

S-ro Szabò salutis la ĉeestantojn kaj informis ilin pri la taskoj kaj laboro de la Ministerio. La prezidanto dankis pro la afabla akcepto kaj esprimis sian kontenton pro la apogo, flanke de la ministerio, rilate Esperanton, je tri niveloj:

1) pro la principa preparo de la instruistoj al esperanto-instruado, en la Universitato; pedagogiaj altlernejoj (per tio estas ŝtate diplomitaj esperanto-instruistoj);
2) pro la multflanka instruado de esperanto en lernejoj kaj aparte pro la faka instruado en Tomori-lernejo;
3) pro la multflankaj eksteraj esperanto-aktivecoj de la gelernantoj.

La ĝenerala sekretario, d-ro Dazzini, donis al s-ro Laszlò superrigardon pri la laboro de ILEI; per dokumentoj li ankaŭ pruvis la sciencan laboron sur tiu ĉi kampo, speciale pere de dokumentoj kiuj ekestis en Italujo; li informis pri la sukcesplena eksperimento en la unua regiono, en kiu ankaŭ partoprenis Hungarujo kaj kies scienca materialo estas ellaborita fare de Prof. d-ro Szerdahelyi de Universitato Eötvös Lorand. D-ro Dazzini petis S-ron Lazslò trovi eblecojn publikigi la materialon hungare kaj esperante, ĉar tiel la signifplena laboro povas esti antaŭmetita al ĉiuj gravaj instancoj en la landoj kiuj partoprenis la eksperimenton. S-ro Ingusz informis nacilingve, pri la stato de la du eksperimentoj. La prezidanto Sonnabend parolis pri la ĝisnunaj rezultoj de la estrarkunsido, informante ke la estraro konsideris la eblecon krei centron en Budapeŝto, kies senco estas kunordigi la pedagogiajn celojn, rilate esperanto-instruadon en la socialismaj landoj; plue li prezentis al la ĝenerala sekretario de la Ministerio, kelkajn kopiojn de IPR, kun la peto trovi la leĝan eblecon ke instruistoj en Hungarujo povu aboni ĝin.

Alia peto estis ke niaj reprezentantoj de ILEI en Hungarujo kaj D-ro Prof. Szerdahelyi ricevu pli facile la permeson viziti eksterlandajn ILEI-kunvenojn.
La ĝenerala sekretario S-ro Lazslò respondis ke li tre atente aŭskultis kaj konstatis ke la informoj estis por li tre interesaj. Rilatante la petojn, li diris ke ni devas havi paciencon ĉar li nun ne povas jesi aŭ nei: la decido dependas de diversaj cirkonstancoj, ĉefe valutaj kaŭzoj. Rilate la aperon de la scienca materialo de la eksperimento, li klopodos realigi la planon. Pri IPR li konsentis ke jam nun 60 abonoj estu eblaj. La kunveno finiĝis je la 11,50 h.

3-2 - **Vizito al la Pedagoga Sindikato.** 19770102.1430a

Akceptis la estraron kaj la akompanantojn, la Sekretario de la Hungara Pedagoga Sindikato s-ro Sàrdi Lajos kaj s-ino Faszan Katalin, ŝarĝita pri la internaciaj rilatoj de la sindikato.
Post kelkaj afablaj salutvortoj, donis la Sekretario detalajn informojn pri la strukturo kaj fortoj de la Sindikato, kiu estas la kvara laŭ nombro inter 18 sindikatoj.
La prezidanto dankis pro la afabla akcepto kaj menciis ke ni ne nur estas instruistoj, sed ankaŭ sindikatanoj; pro tio la informoj estis por ĉiuj tre interesaj kaj impresaj. Li menciis ke la estraro jam vizitis plurajn sindikatojn en Eŭropo, kaj ĉiam konstatis similajn taskojn kaj problemojn. Ĉiam oni sentis la lingvan problemon, ĉar la instruistoj, ĝis nun, ne trovis eliron el la lingva dilemo.
La prezidanto demandis al la sekretario ĉu la hungara sindikato ankaŭ okupiĝas pri esperanto, ĉar jam nun multaj hungaraj instruistoj estas esperantistoj.
S-ro Ingusz nacilingve, parolis pri la eksperimento en la Unua Regiono kaj s-ro Sonnabend aldonis la planon de Ilei aranĝi dum majo internacian lernejon en St. Gerard en Belgujo, kaj substrekis, kvankam la infanoj el la diversaj eksperimentaj landaj lernejoj havos normalajn studhorojn, la unikon de tiu ĉi lernejo, ĉar ili estas diversnaciaj infanoj instruataj de diversnaciaj instruistoj en nur unu lingvo, nome internacia lingvo: li nomis ĝin la estontecan lernejon! Li kore invitis sendi reprezentanton de la sindikato al tiu ĉi aranĝo.
D-ro Dazzini parolis ĉefe pri la idea laboro de ILEI, opiniante ke tiu ĉi mondo nepre bezonas solvon de ĝia plej urĝa problemo: la multflankaj lingvaj diskriminacioj. Li donis tre trafajn ekzemplojn en Italujo, kie la tiel nomataj grandaj lingvoj kreas naciismajn reagojn kiuj kontraŭas al internacieco.
Oni demandis al la Sekretario ĉu la Sindikato povus helpi la eldonon de la scienca materialo de la eksperimento. La respondo estis ke la antaŭvidita kvanto de eldonoj por la jaro 1977a estas jam displanita: eble dum 1978-a oni povus konsideri la eldonon.
D-ro Dazzini atentigis pri la ebleco ke ILEI aĉetu kaj disdonu kopiojn de la eldonitaj dokumentoj al la Universitatoj kaj gravaj instancoj en la landoj kie ILEI havas sekciojn.
La konversacio okazis en tre afabla atmosfero, ĉar la sindikato regalis la ĉeestantojn per refreŝaĵoj. Ĉiu ĉeestanto ricevis riĉan informmaterialon kaj personan donacon. La sekretario de Hungara Esperanto-Asocio estis la enterpretisto. La kunveno finiĝis je la 15,40.



3-3 - **Vizito al la teritoriaj reprezentantoj de la instrua komisiono de H.E.A. (ILEI - sekcio)** - 19770102. 15a

Post la invito al la komuna tagmanĝo en restoracio «Esperanto», je la 15a okazis kunsido en la sidejo de HEA.
S-ino Zsursa Barcsay, sekretariino de Instrua Komitato de HEA, post la prisalutado de la estraro de ILEI, informis la komitaton statistike pri la lerneja stato en hungaraj lernejoj. Poste ŝi petis la estraron de ILEI, informi pri ĝia laboro, inkluzive pri eblecoj aliĝi al ILEI.
La prezidanto de ILEI dankis pro la afabla akcepto kaj petis D-ron Dazzini doni la necesajn informojn, pri la laborsistemo de ILEI.
D-ro Dazzini koncize parolis pri la agadmaniero kaj klarigis kelkajn gravajn erojn de la statuto de ILEI, akcentante ke por plenumi ilin, necesas bona kunlaboro de ĉiuj instruistoj.
Ĉefe li substrekis la taskon instrui esperanton en la lernejoj kaj sekve priatenti ĉiujn rezultojn, kiuj estas la kondiĉo por ĉiuj pliaj pedagogiaj agadoj. Plue li informis pri la ebleco aliĝi al ILEI, indikante ke la modesta kotizo de 1, 50 gld. por ĉiuj, ne estas vere tro alta!
Apude li ankaŭ postulis ke necesas pli da civilkuraĝo peti de la instancoj, kiuj pretigas la budĝeton, permesi la personan pagon por la aliĝo.
La prezidanto informis pri la nuna laboro de ILEI, kiu ekzamenas kaj studas ĉiujn eblajn vojojn por trovi intereson ĉe la diversaj organizaĵoj en la mondo kunhelpi en la solvo de lingva problemo kaj pli vaste pritrakti la fremdlingvan instruadon.
Li opiniis ke necesas la kunlaboro de ĉiuj pozitivaj fortoj, por trovi la taŭgan vojon al la granda idealo de la homaro: humanismo kaj paco. Tute egalas al kiu mondpercepto, raso, religio, la homoj apartenas.
Li nomis kelkajn konkretajn paŝojn; li menciis la kunlaboron kun diversaj organizaĵoj, kiel UEA - AEDE - Frenet Movado - SAT - Sindikatoj. Li informis pri IPR kaj opiniis ke ĉiuj instruistoj devus havi la eblecon aboni IPR. Ankaŭ li informis pri la stato de la eksperimento en la du Regionoj. Parolante pri la organiza strukturo de ILEI, li informis pri la decido de ILEI-estraro krei Centrojn en Eŭropa zono:unu en Budapesto, kaj la alia eble en Parizo, celante la kunordigon de la pedagogia laboro en tiuj ĉi grandaj regionoj.
S-ro Turin aldonis informon pri la laboro de Freinet-movado, substrekante ke la movado akceptis esperanton:ekzemple partoprenis al la Kongreso de Freinet-movado apud Varsovio pli ol 50 esperantistoj el 150 partoprenantoj. Li atentigis ke novaj kongresoj okazos, unue en Portugalujo, poste en Svedujo kaj instigis partopreni.
Kolego Zsolt Gyarmathy, landa inspektoro de eksperimento en la regiono 2, kritikis ke la nuna ekzistanta enhavo de la rezultoj de la unua eksperimento ne estas komprenebla kaj uzebla kaj opiniis ke nepre baldaŭ aperu la aliaj rezultoj kaj petis la estraron de ILEI helpi D-ron Szerdahelyi en la aperado de la tuto.
D-ro Dazzini respondis ke la ĉefa kaŭzo estas la manko de mono por aperigi la

materialon.
S-ro Geza Kurucz, redaktoro de «Juna Amiko», kritikis la enhavon de IPR kaj opiniis ke mankas ankaŭ forma sistemo rilate enhavon. Li proponis ke devus esti artikoloj pri lingva diskriminacio en la mondo, pri instru-metodoj, kaj sugestis resumi mallonge taŭgajn artikolojn nacilingve.
La prezidanto raportis pri la diversaj etapoj de IPR ĝis hodiaŭ kaj konstatis ke sub la redaktoreco de S-ro Turin, la nuna revuo estas en la direkto de liaj deziroj.
S-ro Turin respondis rilate la resuman tradukon ke pli bone estas ke la sekcioj mem traduku resume por la lando gravajn artikolojn.
S-ro Zsolt Gyarmathy sugestis organizi eŭropajn konkursojn kiuj celas la komparon inter diverslingvaj infanoj pri la kono de esperanto.
D-ro Dazzini sugestis ke S-ro Gyarmathy skribu artikolon pri sia ideo kiu povos aperi en IPR kaj en iu cirkulero de ILEI.
Sin anoncis kolegino Palica el Pollando kiel delegitino de Pola Esperanto Asocio, kaj la estraro invitis ŝin partopreni estrarkunsidon de ILEI por samtempe doni informojn pri la lerneja laboro en Pollando. La kunsido finiĝis je la 17 h.

3-4 - **Vizito al Hungara Esperanto-Asocio.** 19770103.16a
Akceptis la estraron kaj la akompanantojn la prezidanto D-ro Jòzsef Mateffy, la sekretario s-ro Tibor Vaŝko kaj kelkaj estraranoj. La renkontiĝo havis tre afablan etoson; post ege ĝentilaj vortoj de la prezidanto, kiu salutis la estraranojn de ILEI, ekestis vigla diskutado en kiu la sekretario de HEA, s-ro Tibor Vaŝko donis kelkajn tre interesajn argumentojn, bone pripensitaj kaj formulitaj, pri pozitiva kunlaboro inter HEA kaj ILEI: Ekestis ankaŭ la demando pri starigo de Centro pri kunordigo de metodikaj procedoj rilate esperanton en la socialismaj landoj. Oni volis scii la konkretajn celojn de la Centro kaj la sekretario de HEA pridubis ĉu oni povos trovi la necesajn homojn.
S-ro Ingusz klarigis ke certe estas en la socialismaj landoj kapablaj homoj, kiuj estos pretaj kunlabori.
Dum la diskutado ĝenerale montriĝis ke la ĉeestantoj principe vidas la pozitivan eblecon:tion aparte substrekis la pola delegitino. La kunsido finiĝis je la 19 h.

3-5 - **Vizito al vic-ĉefsekciestro pri Budapestaj klerigaj Aferoj en la Urbodomo.** 19770104.10a
La estraro estis akceptita de D-ro Gabor Vajna, vic-sekciestro pri Budapestaj klerigaj kaj kulturaj aferoj en la urbodomo. Post la prisalutado, S-ro Gabor Vajna informis detale pri la lerneja sistemo en Budapesto. Ekestis interesa kaj vigla diskutado pri la lingva instruado. S-ro Vajna diris ke ankaŭ hodiaŭ oni devas priatenti la tradicion lingvan; tamen li opiniis ke estontece nepre devas ŝanĝi esence la lingvan instruadon en la lernejoj favore al esperanto. Li ankaŭ same opinias kun la estraro, ke la eblecon, apud la rusa lingvo, fakultative, lerni esperanton en la elementa lernejo. Du konsentoj de li estis por la estraro aparte gravaj:
1) Li petis ke la vicprezidanto s-ro Ingusz, skribu artikolon pri la instruado de esperanto kaj pri la utilo de internacia lingvo por la inter kompreniĝo inter la poloj: la artikolo aperos en la oficiala revuo de la ĉefsekcio:«Bud )esti Nevelo».
2)Li certigis rilate la peton de la vicprezidanto, ke li helpos en la organizado de kurso de esperanto por pedagogoj en la Centra Kulturdomo de la pedagogoj.
3) Li donacis al la estraro du lignajn ĉizaĵojn faritaj de metilernantoj: per tiu donaco ili volis esprimi sian simpation al esperanto. Kune kun la vicprezidanto, li intencas viziti la lernejon por informi pri esperanto kaj eble starigi kurson. La kunsido finiĝis je la 11,40 h.



3-6 - **Vizito al Universitato Eötvös Lorand.** 19770104.12a
Akceptis la estraron kaj akompanantojn la Vic-dekano D-ro Prof-ro Peter Mihaly. La vic-dekano detale informis la estraranojn kaj akompanatojn, inter kiuj ĉeestis D-ro prof-ro Szerdahelyi, pri la historio de la Universitato, pri la fakultatoj kaj studprogramoj. Li menciis ke la nombro de la studentoj estas 3.000 en 3 fakultatoj.
La prezidanto parolis pri unu ĉefa tasko de ILEI, nome prepari instruistojn al esperanto sur la sama nivelo kiun havas aliaj instruistoj pri fremdaj lingvoj, ĉar nur tiel la esperanto-fako en la lernejoj povas esti rigardata serioze. Li informis pri longjaraj konsideroj kaj rezonoj kiuj ekestis inter prof-ro Szerdahelyi kaj li. Ambaŭ opiniis ke oni devus eluzi la eblecojn kaj kondiĉojn kiujn jam donas la esperanto-fako de la Universitato. La rezonoj estis ke nur en la Universitato Eötvös Lorand estas la scienca bazo por esperanto laŭ lingvistikaj kaj interlingvistikaj principoj. Konkrete petis la prezidanto ebligi por eksterlandaj instruistoj korespondajn kursojn kiuj finiĝos per universitata diplomo.
La Vic-dekano respondis, ke li sentas la peton de ILEI kiel grandan honoron por la Universitato kaj promesis prezenti la peton al la Dekano, kaj supozis ke, malgraŭ diversaj obstakloj, la propono povos konkretiĝi: D-ro Dazzini demandis ĉu eblus ke la Universitato zorgu pri la eldono la ampleksa scienca materialo pri la Unua Eksperimento, ĉar ĝi, por la plua laboro de ILEI, estas tre grava.
ILEI estas preta minimume aĉeti 3.000 volumojn en hungara kaj esperanto lingvoj. La vic-dekano tre favoris al la peto kaj post interkonsento kun ŝtataj aŭtoritatoj, verŝajne ne plu estos malhelpoj por la eldono. La kunveno finiĝis je 12,50.

3-6-1 - **Akcepto fare de d-ro Prof-ro Janos Balàzs, katedestro pri aplikita lingvistiko.** 19770104.13a
Per la traduko de Prof. D-ro Szerdahelyi, prof-ro Balàzs preskaŭ prelegis pri la loko de esperanto en la kampo de lingvistikaj sciencoj. En sia tre interesa prelego li akcentis, ke post longjara instruado kaj propagandado de esperanto, tiu ĉi lingvo nepre devas esti science esplorata. Li eliris de la konvinko ke internacieco devas esti konsiderata de du flankoj; internacieco kondiĉas la ekziston de nacioj, tio signifas por esperanto ke ĝi apud nacioj lingvoj koincidas kun la internacieco.
Li ankaŭ opiniis ke por atingi la celon, ankaŭ la helpo de grava organizaĵo kiel Ilei estas bezonata, krome necesas organizi internacian simpozion en kiu esperanto, en vico de aliaj fremdaj lingvoj, devas esti esplorata. Ĉiuj ĉeestantoj estis,

pere de la argumentoj, tre impresitaj. La kunveno finiĝis je la 13.55 h.

3-7 - **Vizito al fakmezlernejo Egressy Gabor.** 19770103.09a

Je invito de la direktoro de la lernejo, s-ro Mehezs Lajos, vizitis la estraro, akompanata de s-ro Behrmann kaj s-ino Palica, la lernejon. La direktoro, per traduko de s-no Tsursa Barcsaj, informis la ĉeestantojn pri la organizo de la lernejo, pri la diversaj fakoj kaj celoj de la instrua laboro. Poste havis la vizitantoj la eblecon rigardi unu klason de elektra fako, kaj unu laborejon en kiu profesiaj lernantoj manlaboris. La vizito finiĝis je la 9a 45.

3-8 - **Vizito al la esperantfakaj gelernantoj de Tomori-lernejo.** 19770104.16a

Akceptis la estraron kaj akompanantojn la direktoro de la lernejo, nia vicprezidanto Johano Ingusz. Li post bonvenigo, konatigis la estraron kun ĉeestantaj gekolegoj kiuj alvenis el malproksimaj urboj kaj vilaĝoj. La infanoj prezentis en aparta ĉambro, vicon de bone preparitaj kantoj, ludoj kaj skeĉoj:ili sukcesis tiucele ankaŭ aktivigi la estraron. Ĉiuj ĉeestantoj forte aplaŭdis kaj la ĝenerala sekretario transdonis kelkajn florojn manlaboritajn de italaj geknaboj, dum la prezidanto aparte gratulis la gekolegojn, s-ino Iren Patay kaj s-ro Francisko Balogh. Poste regalis la direktoro s-ro Ingusz, estraron kaj aliajn gastojn. La vizito finiĝis je la 22,30 h.

4-0 - **Sciigoj de la estraranoj.**

La estraranoj informas pri la farita laboro depost la lasta estrarkunsido en Massa.

4-1 - **Sciigoj de la prezidanto.**

La prezidanto informas detale pri la nuna stato de la eldono de IPR.
Surbaze de la decido en Sanmarino, ke la kredito pagita al IPR estas nuligita kaj ke ĉiuj pagoj kaj plusoj restu en la kaso de ILEI, d-ro Dazzini proponis ke la estraro decidu ke ĉiuj pagoj rilate IPR-on, eniru rekte en la kason de ILEI. Li aldonis ke por la kalkulado de IPR-konto ĝis fino 1976, respondecas la nuna administranto de IPR, s-ro Sonnabend. Li bonvolu, okaze de la estonta ILEI-konferenco, antaŭmeti la finkalkuladon al elektotaj kontrolistoj. Post detala diskuto akceptis la estraro, 4 kontraŭ 1, la proponon. S-ro Olsson petas ke rilate la decidon, oni protokolu la jenon:«Mi estis elektita kasisto de ILEI en Sanmarino, ne kasisto de IPR. En Sanmarino la Asembleo ankaŭ decidis transformi la pruntedonon de ILEI al IPR en elspezo kaj akceptis la proponon ke ĉiuj plusoj en IPR-kaso estu ĝirendaj en la konton de ILEI. Tiun decidon oni faris en foresto de la kasisto de ILEI kaj en la paragrafo estas nenio pri la kaso de IPR nek pri la revizio de tiu kaso. La informon pri la nova situacio mi ricevis la 10-an de Decembro 1976 kaj la estraron decidon la 4-an de Januaro 1977. Pravegas UEA por la miksaĵo de la du kasoj de ILEI kaj IPR». La ĝenerala sekretario protokolis la vortojn diktitaj de s-ro Olsson. La estraro de ILEI decidis ke, laŭ propono de la redaktoro de IPR, gesinjoroj Chapman Ilary, Gunther Doliva, Leo Lentaigne kaj s-ino Otto Elsa eniru en la lingvan kontrolkomisionon pri IPR.

4-1-1- **Rilatoj kun Unesko.**

La prezidanto informis pri la enhavo de sendita letero al Unesko pri la memstareco



kaj sendependa stato de ILEI. Mankas ankoraŭ la responda letero de UEA, kiu, laŭ la interkonsento pri kunlaboro, atestu pri la sendependo, kaj memstareco de ILEI.

4-1-2-**Jura stato de ILEI.**

Mankas ankoraŭ la jura personeco de ILEI kaj post konstato ke en Francujo neniel eblas esti registrita, la ĝenerala sekretario kaj la prezidanto klopodos akiri aŭ en Italujo aŭ en Germanujo la juran registradon de la Ligo.

4-1-3-**Deklaro de la prezidanto pri la interkonsento inter ILEI kaj UEA.**

La prezidanto informis la estraron pri la senco de sia «Deklaro pri la interkonsento inter ILEI kaj UEA». Li provis komprenigi al la estraranoj kial li skribis sian deklaron kaj substrekis ke li ne intencis pridubigi sian pretecon de reala kunlaboro, sed nur intencis diri sian personan opinion. La estraranoj esprimis sian opinion. S-ro Turin kritikis la frazon:« la interkonsento kun UEA estas utila sed ne grava». kaj malaprobas ĝin. S-ro Olsson opinias tiun artikolon tute ne necesan kaj esperas ke tiu afero inter UEA kaj ILEI estis solvita. S-ro Ingusz konsideras la artikolon superfluan ĉar se jam ekzistas interkonsento, estus devinta atendi ĝis kiam la alia partnero reagas. D-ro Dazzini opinias ke la deklaro devis esti subskribita nur de Helmut Sonnabend kaj ne de li kiel prezidanto de ILEI, ĉar la enhavo de la deklaro ne respegulas la decidon de la estraro de ILEI, lojale kaj pozitive kunlabori, kiel memstara kaj sendependa organizo, kun UEA.

4-1-4-**Nuna stato de lerneja eksperimento en 2a regiono.**

La prezidanto informis ke estas antaŭvidite kaj preparate kunvenigi la infanojn en internacian lernejan semajnon en *Saint Gérard,* Belgujo, de 19770514 ĝis 19770520.

4-1-5-**Rilatoj inter ILEI kaj AEDE.**

Internacia kolokvo egalpartia inter ILEI kaj AEDE pri la rolo de esperanto en la instruado kaj pri la instruado de fremdaj lingvoj en Eŭropo, okazis en Parizo 19771110 kaj 11. La prezidanto informis la estraron pri la enhavo de la konkludoj faritaj en la unua kunsido en Parizo inter ambaŭ komisionoj. La estraro konstatis ke la enhavo de la konkludoj estas pozitiva kaj ĝi dankas ĉiujn partoprenintojn en la komisiono, aparte la ILEI-komisiitojn, pri ilia bonega laboro. La estraro konludis ke tiu ĉi fruktodona laboro nepre devas esti daŭrigata kaj opinias ke baldaŭ la estraroj de AEDE kaj ILEI kunvenu en Belgujo por komune diskuti pluajn paŝojn por tiel doni novajn direktivojn al la komisiono. Ĝi ankaŭ konsentas ke en novan komisionkunsidon eniru aliaj membroj.
La estraro de ILEI konsideras, en la sekvo, aranĝi komunan simpozion en Bruselo aŭ en Parizo por studi kiamaniere solvi la lingvan problemon inter la instruistoj kaj kiel eduki niajn infanojn al estonta komuna Eŭropo.

4-2 - **Sciigoj de la kasisto.**

S-ro Olsson informis pri la kasa stato de ILEI. Por 1976 ne pagis la kotizojn jenaj sekcioj:Grekujo, Islando, Israelo, Japanujo, Jugoslavujo, Kanado, Kolombujo, Peruo, Pollando, Sovetunujo, Suda Koreujo. D-ro Dazzini petis s-ron Olsson havigi

al li ĉiujn kopiojn de forsenditaj leteroj, same kiel faras aliaj estraranoj.
La prezidanto proponas al la estraro nuligi la konton en UEA por eviti plurajn kontojn. La estraro aprobas unuanime la proponon, kaj petas ke s-ro Olsson skribu tiucele al UEA.

4-3 - **Sciigoj de la ĝenerala sekretario.**
D-ro Dazzini donis superrigardon pri la stato de diversaj sekcioj kaj de eŭropaj kaj mondaj organizoj.
Apartan atenton li donis al la sekcioj en la socialismaj landoj; li raportis pri la apartaj malfaciloj en la rusa, pola kaj rumana sekcioj; komuna al ili estas la fakto ke ili deziras havi pli da agadeblecoj kaj ke ili estas serĉantaj vojojn por havigi al si la oficialan rekonon de la asocioj kaj de la ŝtato.
Pri Ĉinujo li informis ke estas jam kelkaj eblecoj esplorendaj por poste havi pli direktajn kontaktojn; ekzemple, ekzistas la deziro ricevi dokumentojn por doni pli bonan superrigardon al ili kaj interŝanĝi infanliteraturon. Pri la stato de la kunlaborantaj individuaj personoj, ILEI daŭrigas sian informservon.
Krome li informis pri Eŭropa Centro:voĉlegis la protokolon de la kunsido en Ateno kaj konstatis ke pro la troa okupiteco de la UEA-komitatanoj, oni ne povis profunde diskuti la Eŭropajn problemojn: Ilei kunlaboras laŭ siaj eblecoj, principe kaj precipe sur la teĥnika kampo de la instruado; pri la politika flanko, ILEI ne povas okupiĝi.
Li konatigis al la estraro diversajn dokumentojn de ne esperantaj mondaj organizoj, kun la peto ke la koncernaj estraranoj okupiĝu pri la materialo.

4-4 - **Sciigoj de la vicprezidanto.**
S-ro Ingusz konstatis ke post la interkonsento inter ILEI kaj UEA, la interrilato al socialismaj landaj asocioj normaliĝis. La prezidanto ricevis la informon flanke de la Hungara Esperanto Asocio ke ĝi, kun granda kontenteco, notis la novajn rilatojn.

5-0 - **Redaktado de IPR.**
Pri la redaktado de IPR zorgos kiel ĝis nun, la vicsekretario, s-ro Turin. Por la korekto de la presprovoj helpos d-ro Dazzini kaj Bruĉjo Kasini.

5-1 - **Lingva kontrolkomisiono.**
La gekolegoj Chapman Ilary, Gunther Doliva, Leo Lentaigne kaj Otto Elsa formos la lingvan kontrolkomisionon.

5-2 - **Unuiĝo de la kasoj de IPR kaj ILEI.**
Laŭ la decido de la estraro, la kasisto de ILEI s-ro Olsson enkasigos ankaŭ la abonprezon de IPR por la tuta jaro. La estraro ankaŭ konsideris la eblecon ŝanĝi estonte la formon de la membrokotizoj. IPR-abonantoj pagante la abonprezon aŭtomate pagus ankaŭ le membrokotizon: ne abonantoj devos kontraŭe pagi la fiksitajn membrokotizojn.

6-0 - **XIa Internacia Konferenco de ILEI** (14-24/7/1977).
Kontraŭe al la decido de la Asembleo en Sanmarino, okazigi la konferencon en



Rejkjavik, devis bedaŭrinde la estraro konstati ke la kondiĉoj tie estas tiel malfavoraj ke ili por niaj membroj ne plu estas diskuteblaj. Gefratoj Dazzini en Ateno parolis longe kun s-ro Ragnarsson, sekciestro de ILEI, por esplori la eblecon ricevi pli konvenajn kondiĉojn por okazigi la XIan Konferencon, sed vane.
Post rezigno aranĝi la Konferencon flanke de Prof-roj Sarmiento kaj Regulo Perez en la Kanariaj Insuloj, la estraro esploris aliajn eblecojn kiel en Francujo, en Belgujo kaj en Luksemburgujo. Post analizo de la diversaj kondiĉoj, la estraro elektis Luksemburgujon. Kolego Albert Wickler transprenisla respendecon pri la organizado.

6-1 - **Planado kaj Fiksado de la Konferenco en Luksemburgujo.**
La estraro decidis ke la XIa Konferenco okazu sur Kirchberg apud Luksemburgo, de la 14a ĝis la 24a de Julio 1977.

6-2 - **Fikasdo de la programo de la XIa Internacia Konferenco de ILEI.**
La estraro diskustis pri la formo kaj decidis pri la enhavo de la konferenco. Temo de la konferenco estas:«La kultura valoro de esperanto»
La inaŭguran prelegon faros d-ro Dazzini.
La programo de la konfrerenco dividiĝas en tri partoj:
a) kulturaj prezentaĵoj el la diversaj nacioj,kiel literaturo, muziko, pentrarto;
b) seminario:la materialo de la diversaj studobjektoj celantaj internacian ekzameniĝon;
c) vizitoj al diversaj aŭtoritatoj kaj instancoj.

7-0 - **Resumo de la laboroj.**
Resumo la estraro konstatas ke la estrarkunsido en Budapeŝto plenumis ĉiujn, laŭ la protokoloj, skizitajn dezirojn kaj celojn. Apartan gravecon havis la diversaj vizitoj ĉe la Ministerio pri Edukado, Sindikatoj, Instancoj pri lernejaj aferoj, la Urbodomo kaj Universitato. Tiun ĉi sukceson konfirmis la Hungara Esperanto-Asocio. La Kunsido de ILEI-estraro en Budapeŝto finiĝis je la 19770105.1150a.

La ĝenerala sekretario
(d-ro Prof. Mario Dazzini)

En la venonta numero, ni prezentos la unuajn informojn pri la 11a internacia konferenco de Ilei, kiu – kiel anoncite – okazos en Luksemburgujo de la 14a ĝis la 24a de julio 1977. Tamen jam nun la interesitoj povas ricevi abundajn informojn sin turnante al: Albert Wickler, 4 rue des charbons, Esch-sur-Alzette (Luksemburgujo).

# du proponoj por la nova statuto

## *dana propono*

### Paragrafo 1. (§ 1)

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, en plua teksto la Ligo, estas unuiĝo de Esperanto-parolantaj instruistoj kun rajto instrui en oficiala lernejo. Ili povas aliĝi al la Ligo kolektive per landa sekcio aŭ individue en landoj sen tia organizaĵo.
La Ligo estas memstara en rilato al kiu ajn alia organizaĵo.
Ĝi estas partipolitike kaj religie neŭtrala kaj ne responsas pri propralanda agado flanke de sekcio.
Kondiĉoj por membriĝo estas por sekcio, ke ĝi:
a. havas minimume kvin pagintajn membrojn,
b. estas aprobita de la Liga estraro,
c. pagas regule sian kotizon al la Ligo,
d. rekonas la statuton de la Ligo.
Por individuaj membroj validas la tri lastaj kondiĉoj.
Asocio, Esperanta aŭ ne, kiu konsentas pri la celoj de ILEI povas esti kolektiva membro per pago de la minimuma membrokotizo.

### Paragrafo 2 (§ 2)

La celo de la Ligo estas:
a. unuigi ĉiujn instruistajn Esperanto-organizaĵojn por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn.
b. eventuale aranĝi superajn ekzamenojn pri instruado de la internacia lingvo.
c. organizi pedagogiajn kaj Ligajn konferencojn laŭ invito de unuopaj landaj sekcioj,
d. organizi reciprokajn interŝanĝojn pri spertoj rilate al plibonigo kaj modernigo de Esperanto-instruado,
e. organizi interŝanĝojn de diversaj spertoj en la pedagogiaj scienco kaj praktikado,
f. okazigi diversspecajn aranĝojn internaciajn por infanoj, por ke ili apliku la internacian lingvon,
g. eduki al internacia interkompreniĝo.

### Paragrafo 3 (§ 3)

En realigo de siaj celoj kaj programoj la Ligo kunlaboras kun konvenaj organizaĵoj en kaj ekster la Esperanto-movado.

### Paragrafo 4 (§ 4)

Stampo de la Ligo estas rondformo kun kvinpinta stelo en la mezo kaj litero E en ĝi kaj kun plena nomo de la Ligo.

### Paragrafo 5 (§ 5)

La sekcioj kaj individuaj membroj pagas al la Ligo fiksitan jarkotizon. Individuaj membroj pagas kvinoble.

### Paragrafo 6 (§ 6)

Membreco en la Ligo ĉesas:
a. per libervola eksiĝo,
b. pro dujara nepago de kotizo,
c. pro kontraŭstatuta agado.

### Paragrafo 7 (§ 7)

La organoj de la Ligo estas:
a. la Komitato.
b. la Estraro,
c. la Kontrola Komisiono.



### Paragrafo 8 (§ 8-11-12)

La Komitato estas la plej alta instanco de la Ligo kaj decidoprova pri ĉiu Liga afero. Ĝi konsistas el delegitoj elektendaj dum ĝeneralkunveno de landaj sekcioj jene:
Sekcioj kun
a. ĝis 30 membroj unu delegiton,
b. ĝis 60 membroj du delegitojn,
c. ĝis 90 membroj tri delegitojn ktp.
Laŭ pagitaj membrokotizoj por la antaŭa jaro ricevitaj de la Liga kasisto. Sekcio ne gustatempe paginta perdas la delegitan rajton.
La Komitato kunvenu almenaŭ unu fojon jare kaj se eble en kadro de konferenco. La prezidanto voku al Komitata kunveno almenaŭ ses monatojn antaŭ ĝia okazigo. La kunveno estu publika.

### Paragrafo 9 (§ 9-11)

La komitato de la Ligo en sia kunvena tagordo:
a. pritraktu estrarajn raportojn inkluzive la kasistan de la pasinta jaro elsenditajn al la komitatanoj kaj sekcioj almenaŭ tri monatojn antaŭe,
b. decidu pri aprobo,
c. decidu pri gvidlinioj de la Ligo kaj fiksu laborprogramojn,
d. akceptu aŭ ŝanĝu la statuton,
e. fiksu la budĝeton,
f. fiksu la membrokotizon,
g. elektu estraranojn kaj ties anstataŭantojn,
h. fondu eventualajn komisionojn de la Ligo kaj difinu ties taskojn,
i. fiksu lokon kaj tempon por venonta kunveno post pritrakto de venintaj invitoj,
j. pritraktu proponojn alvenintajn al la komitatanoj almenaŭ ses semajnojn antaŭe.

### Paragrafo 10 (§ 10 - 12)

Se ne eblas trovi unuanime akcepteblain solvojn la Komitato decidas per simpla plimulto de voĉdonantoj.
Sekcioj, kies delegitoj ne povas ĉeesti, povas enflui al la decidoj per skriba argumentado, kiu estu voĉlegata dum la kunsido.
En kazo de neeblo kunveni, okazu referendumo, kies decido validas same kiel tiu de kunsido.
La komitatano estas devigita antaŭe diskuti la tagordon kun sia sekcia estraro.

### Paragrafo 11 (§ 13)

La Liga estraro konsistas el prezidanto, vicprezidanto, sekretario, vicsekretario kaj kasisto.
La oficdaŭro estas trijara, tiel ke en unu jaro oni elektas prezidanton, en alia vicprezidanton kaj vicsekretarion, kaj en tria jaro sekretarion kaj kasiston. (La unuan fojon la oficdaŭro por la vicprezidanto kaj vicsekretario estu unujara, kaj dujara por la sekretario kaj la kasisto).

### Paragrafo 12 (§ 14)

La devoj de la prezidanto estas:
a. prezidi kunsidojn de la estraro kaj komitato,
b. reprezenti la Ligon en ĉiuj eksteraj aferoj,
c. certigi – persone aŭ per komisiitoj – kontakton kaj kunlaboradon kun gravaj instruistaj organizaĵoj kaj institucioj ekster la Esperanto-movado,
d. kunvoki kunsidojn de la estraro kaj komitato.

### Paragrafo 13 (§ 15)

La devoj de la vicprezidanto estas:
a. kontaktiĝi kun la komitatoj kaj la unuopaj komisionoj, orientigi ilin kaj helpi ilin en ilia laboro,
b. anstataŭi la prezidanton je lia foresto,
c. prepari la statistikon pri lernejoj en kiuj oni instruas Esperanton.

### Paragrafo 14 (§ 16)

La devoj de la sekretario estas:

a. respondeci pri la organiza stato de la Ligo,
b. kontaktiĝi kun la landaj sekcioj de la Ligo, instigi kaj orientigi ilian laboron,
c. eltrovi vojojn por instigi fondon de sekcioj en landoj, en kiuj ili ankoraù ne ekzistas,
d. fari la jaran raporton.

Paragrafo 15 ( § 17)

La vicsekretario devas helpi aù, se necese, anstataùi la sekretarion.

Paragrafo 16 (§ 18)

La devoj de la kasisto estas:
a. kontaktiĝi kun ĉiuj kasistoj de la landaj sekcioj klopodante ĝustatempe enkolekti membrokotizojn,
b. esplori eblecojn por solvi financajn problemojn de la Ligo per aliaj rimedoj,
c. fari raporton pri la financa stato de la Ligo.

Paragrafo 17 (§ 19)

La devoj de la landaj sekcioj de la Ligo estas:
a. fari jaran raporton pri la laboro de la pasinta lerneja jaro (decida tago ĉiam la 1a de Januaro) kaj sendi ĝin al la ĝenerala sekretario antaù la fino de Februaro.
b. fari la necesan statistikon kaj raporti pri tio al la Estraro,
c. fortigi ne nur la propran prestiĝon en sia lando, sed ankaù tiun de la Ligo,
d. pagi akurate la membrokotizojn sub mencio de la nombro da anoj en la landa sekcio.

Paragrafo 18 (§ 20)

La kontrola komisiono konsitas el 3 membroj: ĝia tasko estas unufoje en la jaro kontroli ka kasostaton kaj financan manipuladon de la kasisto. Pri la farita laboro la Kontrola Komisiono faras raporton al la Komitato de la Ligo.

Paragrafo 19 (§ 19)

Lo statuto de la Ligo estas ŝanĝebla nur per kunveno de la komitato. Ŝanĝojn devas aprobi 2/3 de la voĉdonantoj.

Paragrafo 20 (§ 20)

Por malfondo de la Ligo devas voĉdoni 2/3 de la voĉdonantoj dum du sinsekvaj jaroj. La komitato decidu pri la posedo de la Ligo utile al Esperanto-pedagogia celo.

Proponita de la dana sekcio en majo 1976



# *sveda propono*

Paragrafo 1.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, en plua teksto la Ligo, fondita en 1949 kaj agnoskita de Unesko la 13an de oktobro 1952, estas unuiĝo de esperantistaj instruistoj, profesiaj aù okazaj.

Ili povas aliĝi al la Ligo aù kolektive per landaj sekcioj, kiuj havas minimume 5 pagantajn membrojn, aù, en landoj kie ne troviĝas organizitaj sekcioj, individue.

Sekcio, kiu petas aliĝon, devas liveri skriban rekonon de la statuto de la Ligo. Pri aliĝpetoj de sekcioj kaj individuoj decidas la estraro pri akcepto aù ne. Tiaj decidoj estu aprobataj aù ne ĉe neksta komitata ĉefkunveno.

Paragrafo 2.

La celoj de la Ligo estas:
a. unuigi ĉiujn instruistajn esperantoorganizaĵojn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn,
b. eventuale aranĝi superajn ekzamenojn pri instruado de la Internacia Lingvo.
c. organizi pedagogiajn konferencojn laù invito de unuopaj landaj sekcioj,
ĉ. organizi reciprokajn interŝanĝojn de spertoj de la monda esperanto-instruistaro rilate al plibonigo kaj modernigo de la esperantoinstruado,
d. organizi interŝanĝojn de la plej diversaj spertoj el la pedagogia scienco kaj praktikado,
e. fari la plej diversajn aranĝojn internaciajn por infanoj, por ke ili apliku la Internacian Lingvon.
f. eduki la infanojn al internacia interkompreniĝo.

Paragrafo 3.

En realigo de siaj celoj kaj programoj la Ligo kunlaboras kun diversaj esperantistaj kaj neesperantistaj organizaĵoj.

Paragrafo 4.

Membreco en la Ligo ĉesas per
a. libervola eksiĝo,
b. preterlaso, laùstatute pagi siajn kotizojn,
c. kontraùstatuta agado.

Paragrafo 5.

Organoj de la Ligo estas a) la Komitato, b) la Estraro, c) la Kontrola Komisiono, ĉ) por specialaj agadoj elektitaj Komisionoj.

Paragrafo 6.

La Komitato estas la plej alta instanco de la Ligo kaj decidopova pri ĉiu Ligaj aferoj. La komitato konsistas el delegitoj, kiujn la landaj sekcioj laù siaj propraj statutoj elektis. Sekcio kun 5-30 pagantaj membroj rajtas elekti unu delegiton, kun 37-60 membroj du delegitojn, 67-90 membroj tri delegitojn, ktp. Ŝlosila bazo estas la ĝustatempe pagitaj membrokotizoj por la antaùa kalendara jaro.

Paragrafo 7.

La komitato kunsidu ĉiun jaron por ĉefkunveno, al kiu la prezidanto voku minimume 6 monatojn antaù ĝia okazigo. Cetere la komitato kunvenas, kiam la estraro aù du sekcioj tion postulas.

La ĉefkunveno de la komitato se eble okazu en la kadro de instruista konferenco. La komitatajn kunsidojn ĉiu membro rajtas ĉeesti kiel aùskultanto. Se la komitato tiel deci-

das, eksterkomitata membro raitas paroli kaj fari proponojn, sed ne voĉdoni.

Ĉe komitata kunveno ĉiu ĉeestanta delegito havas por si mem unu voĉon kaj krome povas sur bazo de rajtigilo voĉdoni por unu, kaj nur unu, delegito de sia landa sekcio. La rajtigilon povas doni la koncerna delegito aŭ la prezidanto de la sekcio.

Simpla plimulto validigas decidojn, se por certaj kazoj la statuto alion ne preskribas.

Paragrafo 8.

La ĉefkunveno de la komitato pritraktas la raportojn de la estraro, de la kasisto, de la kontrolkomisiono kaj aliaj komisionoj, kaj sur la bazo de tiuj raportoj decidas pri liberigo aŭ ne por la estraro kaj koncernaj komisionoj de plua responso pro ilia agado dum la pasinta jaro, decidas pri la gvidlinio de la Ligo, fiksas laborprogramon, decidas pri statuto, budĝeto, membrokotizoj, kaj elektas estraron.

Paragrafo 9.

En kazo de neeblo kunvenigi la Komitaton, la estraro aranĝu referendumon skriban inter la komitatanoj. Per referendumo atingitaj decidoj same validas kiel ĉe komitataj kunsidoj. Por respondi en referendumo la komitato havu tempon de du monatoj. Same kiel ĉe kunsidaj decidoj simpla plimulto validigas la decidojn.

Paragrafo 10.

Por ke la laboro en la Ligo okazu laŭ plej facila kaj plej orda maniero, la komitato por certaj proceduroj povas starigi Regularon, kiu ne havas karakteron de statuto, sed povas servi kiel precizigon de statutaj preskriboj aŭ regularon pri komisionoj ktp.

Paragrafo 11.

La estraro havas la taskon plenumi la decidojn de la komitato kaj inter la komitataj kunvenoj gvidi la aferojn de la Ligo. Ĝi konsistas el prezidanto, vicprezidanto, sekretario, vicsekretario kaj kasisto. La oficperiodo estas trijara. Unu jaron oni elektas prezidanton, duan jaron vicprezidanton kaj sekretarion, trian jaron vicsekretarion kaj kasiston. En okazo, kiam tiu regulo ne konformas al faktaj cirkonstancoj, oni mallongigu la oficperiodon por elektado por atingi konformecon.

Paragrafo 12.

La devoj de la prezidanto estas: a) prezidi kunsidojn de la estraro kaj de la komitato, b) reprezenti la Ligon en ĉiuj eksteraj aferoj, c) certigi – persone aŭ per komisiitoj – kontakton kaj kunlaboradon kun gravaj instruistaj organizaĵoj kaj institucioj ekster la esperantomovado, ĉ) kunvoki kunsidojn de la estraro kaj komitato.

La devoj de la vicprezidanto estas: a) kontaktiĝi kun unuopaj komisionoj, orientigi ilin kaj helpi ilin en ilia laboro, b) anstataŭi la prezidanton je lia foresto, c) prepari la statistikon pri lernejoj en kiuj oni instruas Esperanton.

La devoj de la sekretario estas: a) responsi pri la organiza stato de la Ligo, b) kontaktiĝi kun la landaj sekcioj de la Ligo, instigi kaj orientigi ilian laboron, c) eltrovi vojojn por instigi fondon de sekcioj en landoj, en kiuj ili ankoraŭ ne ekzistas, ĉ) fari la jaran raporton al la komitato.

La vicsekretario devas helpi aŭ, se necese, anstataŭi la sekretarion.

La devoj de la kasisto estas: a) kontaktiĝi kun ĉiuj kasistoj de la landaj sekcioj, klopodante ĝustatempe enkolekti membrokotizojn, b) esplori eblecojn por solvi financajn problemojn de la Ligo per aliaj rimedoj, c) fari raporton pri la financa stato de la Ligo.



Paragrafo 13.

Ĉiuj kotizoj por iu jaro devas esti enpagitaj al la kasisto de la Ligo antaŭ la fino de januaro en la sekva jaro. Sekcioj, kiuj ne plenumas tiun kondiĉon, perdas la rajton havi delegitojn en la sekva ĉefkunveno de la komitato.

Paragrafo 14.

La kontrola komisiono konsistas el 2 membroj kun unu anstataŭanto. Ĝia tasko estas kontroli la kasostaton kaj la financan manipuladon de la kasisto. Pri la farita laboro ĝi ĉiujare faras raporton al la komitato de la Ligo.

Paragrafo 15.

Se la Ligo entreprenas specialajn aranĝojn, kiuj grave influas al la ekonomio de la Ligo, tiuj aranĝoj – ĉiuj aparte – havu apartan kontadon pri sia ekonomio kun por la koncerna entrepreno aparte elektitaj kontrolantoj, kiuj raportu al la komitata ĉefkunveno.

Paragrafo 16.

La devoj de la landoj sekcioj de la Ligo estas: a) fari jaran raporton pri la laboro de la pasinta lerneja jaro (decida tago ĉiam la 1-a de januaro) kaj sendi ĝin al la Liga sekretario antaŭ fino de februaro, b) fari la necesan statistikon kaj raporti pri tio al la Liga estraro, c) fortikigi ne nur la propran prestiĝon en sia lando, sed ankaŭ tiun de la Ligo, ĉ) pagi akurate la membrokotizojn sub mencio de la nombro de la anoj de la landa sekcio.

Paragrafo 17.

La statuto estas ŝanĝebla nur per ĉefkunveno plus ankoraŭa kunveno de la komitato. Inter la du kunvenoj estu tempa intervalo de minimume ses kaj maksimume 15 monatoj. En ambaŭ kunvenoj la ŝanĝon devas abrobi 2/3 de la donitaj voĉoj.

Paragrafo 18.

Eventuala malfondo de la Ligo okazu laŭ la samaj reguloj kiel pri statutŝanĝo. Se okazos decido pri malfondo, la dua kunveno devas decidi ankaŭ, kiel disponi pri la eventuala kapitalo de la Ligo.

## konsilataj libroj.

Kalman Kalocsay – El 'streĉita kordo' – poemoj elektitaj de Vilmos Benczik – Elĉerpa represo de poemoj el la ĉefverka kolekto de la poeto – Budapeŝto, 1976 – 24 paĝoj, 18 cm. broŝurita – 1000 it. liroj.

Giuseppe Ungaretti – La doloro – poemoj 1937-1946 – tradukis Nicolino Rossi – La plej sentoplenaj versoj de la homo, kiu revoluciis la poezion en Italujo, en la majstra traduko de unu el la plej talentaj poetoj de la moderna skolo. – La Nuova Frontiera, Pizo, 1975 – 64 paĝoj, 21 cm., kartone bind. – 1800 it.liroj.

**por viaj libromendoj vin turnu al la libroservo de Ilei "A. Vallerini" via consoli del mare 15 – i-56100 pizo, italujo – poŝtĉekkonto 22 / 10219.**

# *al la aŭtoroj de artikoloj por IPR*

**Informo de la redaktoro de Internacia Pedagogia Revuo, Gaston Turin.**

Pluraj legantoj de IPR atentigis la estraron de ILEI pri la lingvaj eraroj entenataj en nia revuo. Ili opinias – kaj laŭ ni ili pravas– ke revuo de instruistoj nepre devas esti lingve altnivela. Ni rimarkis, ke multaj eraroj venas de nekonscia influo de la gepatra lingvo. Pro tio ni konsilas al niaj korespondantoj ke ili legigu siajn artikolojn de kompetentaj eksterlandanoj, kiuj korektos tiajn erarojn. La nomo kaj adreso de la kontrolanto aperos apud tiuj de la aŭtoro.

Se vi, aŭtoroj, ne konas taŭgajn kaj bonvolemajn helpantojn, ni proponas al vi tiujn:

| | |
|---|---|
| *por ne-francoj:* | *s-ro Leo Lentaigne, 3 avenue de la gaillarde, F-34000 Montpeller, Francujo* |
| *por ne-germanoj:* | *s-ro Günter Doliva, Berger strasse, D-3036 Bomlitz, F.R.Germanujo* |
| *por ne-britoj:* | *s-ro Hilary Chapman, 7 fairacre road, Barwel, Leicester, GB-LE9 8HH, Britujo* |
| *por ne-nederlandanoj:* | *s-ino Elsa Otto, Valkenboskade 502, NL-2026 Den Haag, Nederlando* |

Tiuj kvar kolegoj estas pretaj re-legi viajn manuskriptojn kaj fari siajn rimarkojn pri la lingvo.

Ni deziras ja ricevi artikolojn de ĉiuj instru-gradoj: elementa, mezgrada kaj supera. Ni esperas okazigi rilatojn inter la diverslandaj instruistoj. Jam kelkaj legantoj skribis al ni, por ke ni transsendu leteron al la aŭtoro de artikolo, kiu interesas ilin. Ni petas, ke tiaj legantoj rilatu rekte kun la aŭtoro. Pro tio aŭtoro ne forgesu skribi sian propran adreson.



## Estraro de ILEI

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Rektoro Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42 D-315 Peine (Fed. Resp. Germanujo) |
| Vicprezidanto: | Direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapest X, (Hungarujo) |
| Sekretario: | D-ro Mario Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa C., (Italujo) |
| Vicsekretario: | S-ro Gaston Turin, 43 Rue Emile Magnin, F-25300 Pontarlier (Francujo) |
| Kasisto: | S-ro Olle Osson, Bantorget 3, S-222 29 Lund (Svedujo). p.ĝ.k. Stockholm 682 117-7. |

## Sekciestroj de la Ligo

| | |
|---|---|
| Aŭstralio: | Ivan Th. Maddern, Box 411, Morwell, Victoria 3840 |
| Aŭstrujo: | Ernst Rixner, Kleingasse 6 - 18/8/13, A - 1030, Vieno |
| Belgujo: | G. Pirlot, Residentie «Vaughan», Kemmelbergstraat 3-5/b.3 B-8400 Oostende |
| Brazilo: | Elvira Fontes, Caixa Postal 5888, São Paulo |
| Britujo: | Hilary Chapman, 7 fairacre road, Barwell, Leicester, LE9 8HH. |
| Bulgarujo: | Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia |
| Danlando: | Lis Thune, Brembärvänget 15, DK-2650 Hvidovre |
| Finnlando: | Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82 |
| Francujo: | F. Le Magadure, 23 Rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont |
| F.R.Germanujo: | Hermann Behrmann, Ellerbuscher Str. 81, D-4972 Löhne 1 |
| Grekujo: | Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, Ateno (816) |
| Hispanujo: | Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante |
| Hungarujo: | Marta Cser, Zelau út. 10-14, H-1368 Budapest V |
| Islando: | Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík |
| Israelo: | Ron Aser, Raanana, Aŝer 5 |
| Italujo: | Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C. |
| Japanujo: | Gamon Higashi-cho 6-51, Koshigaya-shi 343 |
| Jugoslavio: | Miodgrad Stojanoviĉ, Duruntorska ul. 2/IV-32, YU-11000 Beograd |
| Kanado: | George du Temple, 930 Ardmore Drive, R.R.2, Sidney, B.C. V8L 3S1 |
| Kolombio: | Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin |
| Koreujo: | Dae Young-Rhie, 240-19, Sang-do-2-dong, Yong-dung-po Ku, Seoul |
| Nederlando: | O. Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1719 Schoorl |
| Norvegujo: | Elna Matland, Brekkeveien 50, N-4200 Sauda |
| Nov-Zelando: | Gwenda Sutton, 1 Wood Street, Upper Hutt |
| Pollando: | Teresa Nemere, str. J: Olbrachta 3/5 m 12, PL-87-100 Toruń |
| Rumanujo: | Prof. D-ro Gabriel Tepelea, Calea Grivitei N-ro 222, Bloc 7, Scara B Bucureşti 8 |
| Sanmarino: | Prof. Marina Michelotti, via XXV marzo 73, I-43031 Rep. S. Marino |
| Sovet-Unio: | Johannes Palu, Sôlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV<br>Nikolaj Starodubĉev, poŝtrestante, SU-340047 Doneck |
| Svedujo: | Olle Olsson, Bantorget 3, S-222-29 Lund |
| Svislando: | |
| Usono: | John L. Lewine, West Stockbridge, MA 01266 |

## Kunlaborantaj organizoj aŭ izolitaj membroj

| | |
|---|---|
| Ĉeĥoslovakujo: | Karel Kraft, pošta 5, Zdaboř V-28, CS-261 05 Přibram |
| Germana DR: | Ludwig Schödl, Rosa Luxemburgstr. 37, DDR-195 Neuruppin |
| Kubo: | Pedro Pablo Lamas Díaz, Apartado 223, Ciego de Avila |
| Zairujo: | Antome-Samuel Ngangu, B.P. 13, Lukala (Nkandu) |

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)
Oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)
Aperas trifoje jare.

Redaktis: G. Turin
43, rue E. Magnin
F - 25300 Pontarlier

Konto: Poŝtĝirkonto: Stockholm 682 117-7
Olle Olsson, Bantorget 3
S-222 29 Lund (Svedujo)

Jara abono: 16 svedaj kronoj aŭ egalvaloro.
La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI.
Nemembroj de ILEI povas pagi al la supre indikita konto.